

Magdeburga folio

Neregula interreta informilo
pri aktualaĵoj
el la mondo esperantista



N-ro 141(41)

Septembro-Oktobro 2017

ENHAVO:

Finlernintoj de Duolingo duoble superas UEA-n	2
La 69-a Internacia Fervoĵista Esperantokongreso	3
Homrajta breviero	5
Kial oni ne lernas Esperanton?	6
Cezar: Ĉu vi scias...	7
Komune festi la Novan Jaron	11
ILEI raportas	12
Unesko-kuriero en Esperanto eldoniĝis	12
Lexus eldonos nur ses numerojn de Heroldo en 2017	13
Laborplano donis nur hirtajn harojn	14
La 50-a ILEI-Kongreso en Busan	16
La 90-a SAT-Kongreso	18
La 102-a Universala Kongreso	19
Zamenhof-Ekspozicio en Vilno	21
Profesie presitaj libroj jam ekde 1 ekzemplero!	23
Vladimir Putin menciis Esperanton!	24

Finlernintoj de Duolingo duoble superas UEA-n

Fine de majo la suma kvanto de la homoj, kiuj eklernis Esperanton ĉe la retejo Duolingo, superis milionon. Proksimume kvin procentoj el la eklernintoj finas la kurson. Tio signifas, ke la kvanto de finlernintoj nun almenaŭ duoble superas la membrokvanton de UEA.



La kurso de Esperanto ĉe Duolingo estas pli populara ol tiu de la vjetnama, sed malpli populara ol la kurso de la hebrea.

En du jaroj la Esperanto-kursoj ĉe la populara lingvolerna retejo Duolingo atingis sume pli ol milionon da eklernintoj. La kurso en la angla lingvo estis lanĉita en majo 2015, la kurso por hispanlingvanoj fine de 2016, kaj la 27-an de majo 2017 la suma kvanto de eklernintoj en tiuj du kursoj atingis unu milionon.

La kvanto de lernantoj plu kreskas: unu monaton poste la kvanto de lernantoj en la anglalingva kurso estas proksimume 911.000 kaj en la hispanlingva ĉirkaŭ 150.000. Do, dum monato al la unua miliono aldoniĝis pliaj 61.000 lernantoj, dumil novuloj ĉiutage.

Tio tamen ne signifas, ke miliono da homoj en la nuna momento studas Esperanton ĉe Duolingo, atentigas Lu Wunsch-Rolshoven, kiu akompanas la Duolingo-projektojn jam ekde la komenca fazo:

– Temas pri unu miliono da homoj, kiuj komencis la kurson. La nombro de nuntempaj aktivaj lernantoj estas nur eta parto. Antaŭ monatoj venis informo, ke 5.000 lernantoj uzas la kurson ĉiutage. Mi kredas, ke tio estas sufiĉe kutima kvanto por senpaga kurso. Homoj venas, intense lernas, foriras kaj poste iam revenas.

Kiom da homoj finlernis?

– Eble finlernis 30.000 ĝis 50.000 homoj per Duolingo mem. Ja antaŭ pli ol unu jaro ĉiutage jam finlernadis 30 homoj kaj antaŭ duonjaro estis jam 100 finlernantoj tage. Verŝajne nun eĉ pli. Aldoniĝas homoj, kiuj finlernis en aliaj retejoj aŭ private aŭ per la praktiko.

Supozeble proksimume kvin procentoj el la studantoj efektive finas la kurson, se konsideri ke estas cent finlernintoj kaj dumil novuloj ĉiutage.

La suma kvanto de individuaj kaj asociaj membroj de la plej granda esperantista asocio, UEA, fine de 2016 estis iom pli ol 13.000. Tio signifas, ke la homoj kiuj finstudis la kurson ĉe Duolingo estas minimume duoble, eble trioble pli multaj ol la membroj de UEA. Sed ĉu eblas iel taksu, kiom el la finintoj iel poste uzas la lingvon – en la reto aŭ en fizikaj renkontiĝoj?

– Tre malfacila demando – ne estas indikoj pri tio. La solajn statistikojn tiurilate mi povas doni de Amikumu kaj Telegramo. En Telegramo, estas 4.352 unikaj uzantoj en ĉiuj esperantistaj grupoj kaj laŭ enketo plejparto de ili lernis Esperanton per Duolingo. Cetere, en Amikumu, estas 4.354 uzantoj (nivelo: 45 denaskaj, 828 altaj, 1164 mezaj, 1062 bazaj).

Tamen, ne eblas scii precize kiom el tiuj homoj lernis per Duolingo. Krome, la uzantoj ĉe Telegramo kaj Amikumu nur parte estas la samaj homoj – estas pli da nejunuloj ĉe Amikumu, kaj pro juraj kialoj personoj sub la aĝo de 18 jaroj eĉ ne rajtas aliĝi al Amikumu.

La sekva lingvo, en kiu la Esperanto-kurso de Duolingo estos havebla, estas la portugala. Ankoraŭ ne klaras, kiam ĝi pretos, sed jam preskaŭ 20.000 homoj aliĝis por partopreni la kurson, kiam ĝi haveblos. Ankoraŭ ne estas decidite, kiu estos la sekva lingvo post la portugala, en kiu la kurso estos havebla, rakontas Lu Wunsch-Rolshoven.

– La kandidatoj estas ekzemple la franca, rusa, germana kaj ĉina. Dependos de la takso de la Esperanto-teamo por Duolingo, sed ankaŭ de Duolingo mem.

El "Libera folio"

La 69-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 16. - 23. majo 2017

Ĝi okazis en tre bela kaj riĉa regiono de Alzaco en la pitoreska urbo *Colmar*. La eventon kunorganizis pluraj asocioj, inter kiuj membroj de "Espéranto-France Est" sub la gvido de André Grossmann kaj Edmond Ludwig. Partoprenis ĝin 147 esperantistoj el 21 landoj. Ĉi-foje la fervojista kongresa semajno komenciĝis marde per kunvenoj de la IFEF-estraro kaj LKK. Posttagmeze alvenadis gastoj, kiuj estis bonvenigataj en la stacidomo krom tiuj, kiuj alvenis per propra aŭtomobilo. Vespere ĉiuj konatiĝis en saloneto de la hotelo *Les Balladins*.

La solenan malfermon ĉeestis renomaj gastoj; nome de UAICF (Arta kaj kulturfleganta Unuiĝo de Francaj Fervojistoj) prezidanto Ghislain Heinen, nome de BSW (fervoja sociala entrepreno) s-ino Barbara Sciesinski. Nome de la urbo, la vicurbestrino de *Colmar* s-ino Cécile Striebig. Estis legataj salutoj de kelkaj E-organizoj inkluzive tiu de UEA. Okazis disdono de honoraj diplomoj pro elstaraj kaj sindonaj meritoj subtene al IFEF al elektitaj esperantistoj. Sekvis salutoj de la partoprenantoj de ĉiuj ĉeestantaj landoj, kiun gvidis la ĉefdelegito Jindřich Tomášek. La kongreson post la solena parolado kaj kantado de la himno inaŭguris la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Poste ni estis invititaj al aperitiva tostado per alzaca vino akompanata per speciala regiona kuko, kiun prizorgis por ni la organizaĵo TAKE sub gvido de Michel Basso. Sekvis komuna fotado. En la loka ĵurnalo aperis

artikolo pri la evento kaj krome ĝi estis anoncita sur municipa informtabulo. Posttagmeze eblis piede malkovri la belaĵojn de la urbo aŭ trapasi ĝin per verda turisma trajneto. Vespere ni ĝuis agrablan kulturan programon de la loka folkloro grupo *Vogesia* kun ebleco kundanci.

Dum la semajno okazis pluraj komitatkunsidoj, laborgrupoj, kaj kunsido de faka komisiono, estis traktataj movadaj aferoj, okazis ateliero pri informadiko, kurso por komencantoj. Bone ekipita estis la libroservo. Ĝi proponis librojn pri "Etaĵoj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo" inkluzive en Esperanto. Ankaŭ eblis aĉeti bildkartojn kaj specialan poŝtmarkon. En la kongresejo *Les Catherinettes* estis instalita ekspozicio pri Esperanto.

Interesis prelego pri "PowerPoint pri FISAIC", kiun prezentis Lena Niemann. Pri trajnlinio inter Dresdeno kaj Prago parolis Ladislav Kovář. Laurent Vignaud detale klarigis pri la dekstraflanka trafiko en Francio. La prelegon akompanis kelkaj bildoj. Same interesa estis prelego de Pierre Grollemund pri la tegmentoj de la stacidomo en *Colmar*. De Edmond Ludwig ni eksciis multajn interesaĵojn pri la regiono Alzaco, de Zlatko Hinšt pri la ĉefa stacidomo en Zagrebo. Pri aventuroj dum la trajna veturado en Barato estis prezentita filmo de ges-roj Gabalda. Ankaŭ Mireille Grosjean parolis pri siaj tranjnaventuroj. Krome ŝi okaze de la Jaro de lernanto prezentis kelkajn skeĉojn teatrumante kun aliaj adeptoj.

Samtempe okazis komitatkunsido de EFE (Esperanto France-Est). La partoprenantoj povis ĝui programon de IFEF.

Venontan IFEF-kongreson, kiu okazos de la 21-a ĝis la 28-a de majo en Vroclavo (Pollando), prezentis per filmetoj la organizontoj. Ĉe la fino estis al ili transdonita la IFEF-standardo. Dum la vespera koncerto Maria Grazia Barboni kantis por ni Esperante kaj krome ŝi prezentis kelkajn kanzonojn de Edith Piaf.

Tre allogaj estis la duontagaj ekskursoj. Vastan ekspozicion de diversspecaj trajnoj, lokomotivoj, vagonoj kaj aliaj fervojaj artefaktoj ni povis admiri en la fervoja muzeo *Cité Mulhouse du Train*. Aliaj plaĉaj ekskursoj konatigis nin kun la urbetoj *Kaysersberg*, *Riquewihr*. En *Hunawihr* ni vizitis ĝardenon de vivantaj ekzotikaj papilioj. La tuttaga ekskurso kondukis nin al Strasburgo. Ĉirkaŭveturante per buso la parlamentejon, palacon de Eŭropo kaj aliajn gravajn konstruaĵojn, ni enboatigis por promeni sur la rivero *Ill*. Dumvoje ni rigardis belajn fasadojn de mezepokaj trabfakaj domoj. Post la boatado ni admiris la duan plej altan katedralon en Francio kaj aliajn stratojn de la urbo. Ravis la kvartalo *Petite France*.

Post la fermo de la kongreso okazis pluaj ekskursoj. Unue al la mezepoka burgo *Haut-Koenigsbourg*, kiu troviĝas ĉirkaŭ tridek kilometrojn norde de *Colmar*. Impona konstruaĵo kun multaj ĉambroj impresis nin. Vilaĝo *Ribeauvillé* estas konata pro vinkultivado. En *Hunawihr* troviĝas ankaŭ parko de la cikonioj kaj lutroj. Tie estas prizorgataj diversaj bestoj. Ni observis plurajn cikoniidojn dum la manĝado. Kelkaj estis freŝe naskiĝintaj (du-tagaj) kaj aliaj kelkmonataj. Ili havis nekredoblan apetiton. Dum la prezentado de lutroj ni spektis trejnitaĵojn kormoranojn, pingvenojn kaj aliajn bestojn. Ĝi estis tre interesa spektaklo aliamaniere prezentita ol oni kutimas vidi en amuzparkoj. Tre pitoreska estas la urbeto *Eguisheim*, kiu famas pro tiea protektantino de Alzaco, *Sankta Odile* kaj pro la naskiĝo de la papo Leo la IX-a (1002-1054). Vera vivanta vilaĝo, al kiu estis translokitaj aŭtentikaj trabfakaj domoj, estas la Ekomuzeo de *Ungersheim*. Amaso da cikonioj instaligis en tiu loko. La kongreso estis riĉenhava kaj bonetosa. Koran dankon al la organizantoj! La belega urbo *Colmar* ravis ĉiujn.

Liba Gabalda

Homrajta breviero



***Fundamento de la homaj rajtoj* / Tradukis Humphrey Tonkin; Antaŭparolo de Mark Fettes; Enkonduko de Maria Rafaela Urueña. [Roterdamo]: UEA, 2016, 96 p.**

UEA eldonis poŝbroŝuron kun kolekto de la ĉefaj UN-dokumentoj pri la homaj rajtoj. La kolekton eniris la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj du Internaciaj Paktoj: pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. La teksto de la Universala Deklaracio estas kanona, ofte publikigata en Esperanto, la tekstoj de la Paktoj estas freŝe kaj modele tradukitaj de Humphrey Tonkin kaj kontrolitaj de Brian Moon.

La tekstojn antaŭas antaŭparolo de Mark Fettes kaj enkonduko pri historio kaj nuna stato de la homrajtaj dokumentoj kaj institucioj, verkita de M. R. Urueña. La enkonduko estas elĉerpa, kvankam ial la aŭtorino plene forgesis, rakontante pri la Eŭropaj dokumentoj kaj instancoj, la Helsinkajn Konvenciojn de 1975 kaj la bazitan sur ili OSCE, kies signifo por la homrajtprotekta problemo ne estas subtaksenda. Ĝenerale, la broŝuro, kiel facile konsultebla fonto pri la ĉefaj homrajtaj dokumentoj kaj precizaj formuloj, estas tre utila por ĉiu havanto.

Amuza momento: kiel la aŭtoroj de la eldonaĵo estas indikitaj M. Fettes kaj M. R. Urueña, kvazaŭ ili verkus ne nur la antaŭparolon kaj enkondukon, sed ankaŭ la Deklaracion kaj la Paktojn! Ni esperu, ke tio estas nur amuza miso, sed ne superambicio...

Nikolao Gudskov

Ĉi tiu recenzo aperis en la julia numero de *La Ondo de Esperanto* (2017).

Ĉe represo bonvolu nepre indiki la fonton:

Papere: *La Ondo de Esperanto*, 2017, N^o7.

Rete: *La Balta Ondo* <http://sezonoj.ru/2017/06/recenzo-77>

Kial oni ne lernas Esperanton?

La plej multaj homoj trovas Esperanton neinteresa. Ne indas trudadi la lingvon al tiuj, kiuj ne volas aŭdi pri ĝi. Prefere ol propagandi, indas mem lerni la lingvon bone kaj uzi ĝin en internaciaj kontaktoj, skribas Liu Xiaozhe.



Liu Xiaozhe

Komencantoj de Esperanto ofte fervore propagandas tiun lingvon al ĉirkaŭaj homoj. Ili sentas, ke tiu magia lingvo por ili malfermis la pordon al la mondo. Do ili esperas, ke ĉiuj aliaj homoj ĝuos tiun rarajn.

Sed tre ofte ili ankaŭ senesperigas.

Oni trovas, ke multaj informitoj, ekscitante pri la ekzisto de la internacia lingvo, nur surprizigas pri la artefablo de homa lingvo, sed ili tuj forgesas ĝin turninte la atenton al alia afero. Iuj scivolaj forlasas la lernadon post nur kelkaj lecionoj.

La komencanto denove estas la sola lernanto en la loko.

Kial? Kial oni ne varme brakumas tiun bonan lingvon kun bela interna ideo? Kial ilin ne interesas tiu lingvo, kiu povas forigi la lingvan baron en la internacia komunikado?

La kaŭzo fakte estas simpla: multaj homoj tute ne interesiĝas pri la lingva problemoj! Por ili, krom sia gepatra lingvo, la aliaj lingvoj, per kiuj oni povas interflui kun nesamlingvaj homoj, estas tute superfluj kaj nenecesaj!

La amatoroj kaj interesatoj de iu afero inklina opinii, ke ilia celitaĵo estas la plej grava afero. Multaj subtenantoj de Esperanto ne konscias, ke por aliaj homoj estas aliaj pli gravaj aferoj ol la lingva problemoj.

Jes, Esperanto alportas al vi ĝojon kaj ĝuon, sed multaj homoj ankoraŭ baraktas por la manĝaĵo kaj vestoj, do ili ne havas tempon kaj energion pripensi la bezonon je spirito.

Jes, lokaj esperantistoj multe helpas vin dum via vojaĝo en aliaj landoj, sed multaj homoj eĉ neniam foriras el siaj naskiĝaj vilaĝoj aŭ urbo.

Jes, per Esperanto vi povas konatiĝi kaj interflui kun homoj en diversaj landoj, sed multaj homoj kontaktas aliajn nur en la ĉiutagaj vivo kaj laboro, ne havante aliajn konatojn eĉ en sia urbo.

Jes, per Esperanto vi povas legi informojn el diversaj partoj de la mondo, sed multaj homoj ne povas aŭ ne volas legi ĵurnalon eĉ en sia nacia lingvo.

Jes, Esperanto estas lingvo kun bela ideo, kaj partopreni en la Esperanta movado estas kontribuo al pli bela mondo. Sed multaj homoj opinias, ke estas multaj aliaj aferoj pli gravaj ol la lingva problemo en la mondo, ekzemple, malriĉo, malsato, medio, akva riĉfonto, klimato, homaj rajtoj, ktp..

Iuj homoj ne lernas Esperanton, ĉar ili neniam aŭdis pri ĝi. Sed plejparto de homoj ne havas intereson al Esperanto, eĉ jam detale informite pri tiu lingvo!

Ĉiuj havas propran intereson. Altrudi la sian al alia estas ne-efike kaj ofte malŝatate. Estas tute normale, ke oni ne interesiĝas pri Esperanto kaj ne lernas ĝin.

Do, kion ni faru? Ĉu ni ĉesu propagandi Esperanton al aliaj homoj?

Propagandado nepre estas farinda laboro, kiu povas varbi latentajn lernantojn. Sed se oni ne interesiĝas pri nia lingvo, ni ne daŭrigu proponi ĝin al ili. Kaj ni ne tro senesperigu. Ĉar ne ekzistas afero, kiu povas altiri ĉiujn homojn. Sufiĉas, ke ĉirkaŭaj homoj sciu pri Esperanto, kaj ili mem elektu ĉu lerni aŭ ne.

Fakte, estas pli efika rimedo propagandi la lingvon Esperanto, nome, ni mem lernu kaj uzu ĝin en la internaciaj kontaktoj. Vidinte, ke Esperanto estas utila, la veraj interesatoj lernos ĝin. Ni influu aliajn homojn per nia agado, sed ne per senĉesaj ripetitaj vortoj. Kiel oni admonas iujn religi-anojn: ne nur deklaru vian religion paca, sed ankaŭ agu pace!

Solis (Liu Xiaozhe)

La teksto unue aperis en la blog de Liu Xiaozhe

Cezar: Ĉu vi scias....

<http://cezaroriginaloj.blogspot.de/2012/07/cu-vi-scias-rakonto.html>



Übermorgen

Weißt du, wie viel Sternlein stehen
an dem blau-en Him-mels-
zelt? Weißt du, wie viel Wol-ken ge-hen weit-hin ü-ber al-le
Welt? Gott der Herr hat sie ge-zäh-let, das-sich auch nicht ei-nes
feh-let an der gan-zen gro-ßen Zahl, an der gan-zen gro-ßen Zahl.

Verbumen

Estis iam malgranda knabo en eta vilaĝo kun dudek domoj kaj gastejo. La knabo havis la nomon Erik. Kiel ĉiuj vilaĝaj knaboj li estis aventurulo, knabo, kiu nepre volis scii, kio tio estas, la mondo. Bunta ĝi estis kaj nekredeble bela. Sed ekzistis ankaŭ aferoj, kiuj ne estis en ordo.

Ekzemple tie estis la patro. Ĉar Erik ankoraŭ ne lernis per pseŭdosciencaj klarigoj vualaj sociajn maljustaĵojn per densa nebulo, li simple nomis lin la malica patro. Tiu estis kiel juna viro, en la lastaj monatoj de la Dua Mondmilito, laŭdire ano de la fifamaj SS-trupoj de la Germana Regno. La avino vidis la tatuaĵon sur lia brako. Kaj la patrino de Erik eĉ asertis, ke li servis kiel skribisto en koncentrejo. Sed pri tio Erik kompreneble ankoraŭ sciis nenion.

La patro ĉiutage trinkis multajn bierojn kaj krome brandojn kaj verdajn mentlikvorojn. Do la patro drinkadis, kaj se li estis ebria, li tradraŝis la patrinon de Erik. Li draŝis ŝin tiel senrespekte kaj tiom forte, ke la patrino ofte malesperiĝis, tiel ke ŝi konsideris la vivon puno kaj ofte eĉ plorsingulte larmis. Tiam la malgranda Erik ĉiufoje mankaresis ŝin kaj diris: „Nu, ne ploru, panjo, vi ja havas ankoraŭ min, mi estas ĉe vi. Ĉio ankoraŭ fariĝos bona, vi vidos, panjo.”

Kion alian fari? La patro estis ja kiel peza pluvoporta nuboj en la ĉielo, neforigebla. Se li ekfuriozis, tiam ne eblis retiriĝi, por tio la loĝejo estis tro malgranda. Tiajn fulmotondrojn oni devis elteni, tiukaze helpas nenio. La knabo povis fuĝi en alian domon, se li ankoraŭ ĝustatempe foriris, tion li povis fari, sed li ne povis forpeli la fulmotondron for de la patrino, tio ne eblis. De kie preni kiel knabeto tiom fortajn pugnojn?

Venis la tago, kiam la patrino de Erik tiom malesperiĝis, ke ŝi prenis hakilon por mortbati la patron. Sed kiam ŝi minacis lin per la hakilo, li nur ridis. Li ŝiris la hakilon el ŝia mano kaj ĵetis ĝin tra la fermita loĝoĉambra fenestro en la korton.

„Per hakilo oni hakas brulŝtupojn, serpento, sed oni ne dishakas homon per ĝi“, diris gaje la potenca neatakebla patro. Estis ankaŭ por li mem neskribita leĝo, ke neniu kapablas venki lin.

Ne tre malproksime de tiu vilaĝo troviĝis alia vilaĝo. Kaj en tiu vivis la avino de Erik. La avino estis bonkora, ja ŝi estis pli ol tio. Ŝi estis sanktulino por Erik. Tiom ofte, kiom eblis, Erik vizitis la avinon kaj ĝuis tie mem karesojn de la avino, kiu dorlotis lin kvazaŭ li estus la propra infano.

Kiam iutage denove giganta ŝtormo traskuis la gepatran hejmon, Erik decidis forlasi ĝin por ĉiam. Plej prefere li estus kaŝinta sin ie, kie neniu povus trovi lin. Sed tio ne eblis. Por la plej proksima urbo li bezonus sepmejlajn botojn, sed tiujn li ja ne havis. Tial Erik decidis fuĝi al la amata avino.

Rapide li liris el la domo, kaj eĉ pli rapide for el la vilaĝo, kiu tute ne plaĉis al li. Li estis nervoza kaj timema kaj lia koro batis kiel martelo en lia brusto. Nur kiam li estis jam pli ol cent metrojn post la enirŝildo de la forlasita vilaĝo, Erik profunde elspiris. Estis somero kaj la ĉielo estis perfekte blua. Kelkaj nubosafaĵoj tie supre marŝis en la sama direkto kiel li. Li rigardis tion kiel bonan antaŭsignon. Li ekjubilis kaj laŭte

kantis iujn melodiojn, kiuj venis en lian kapon. Tiun pri la majskaraboj, pri tio, ke super la nuboj la libero devas esti senlima. Li imitis birdovoĉojn, kiel li lernis tion de la gajaj pepantoj mem. Hehe kaj hoho! Kiel belege estas la vivo! Haha kaj hoho! Erik trumpetis sian vivoĝojon en la mondon.

Dekstre kaj maldekstre de la vojo ondadis orflave la spikokampoj. Elegante riverencante la tigoj kliniĝis antaŭ Erik, kvazaŭ ili volus diri: „Ĉe Dio en la alto! Vi estas ja efektive kuraĝa bubo!”

Ja fulmo kaj tondro! Bela estas la vivo, tute eksterordinare bela. Erik kantis tiel laŭte kiel li povis. Se li ne kantis, li imagis la koleran vizaĝon de la patro. Sed li eĉ ne iomete timis lin. Neniam denove mi reiros, li pensis, neniam, malica patro, pri tio certu!

Erik iris fajfante, kuris, ĵetiĝis en la tritikon kaj ree iomete kuregis. Pli kaj pli li rapidis. Tie antaŭe videblis jam la pinto de la preĝejo. Tie antaŭe estis ja la avino, tie antaŭe estis ĉio, kio malantaŭ li ne estis. Pli kaj pli grande elformiĝis la tegmento de la preĝejo kaj el ĝi la preĝejo mem kaj laste la tuta vilaĝo. Ĉar estis la plej bela vilaĝo en la vasta pejzaĝo, kiun li povis imagi, li ankoraŭfoje haltis. Li ĝuis la vidaĵon per vaste malfermitaj okuloj. Ĉio estis tiom intima al li. Nur poste li kvazaŭ kiel moŝto eniris en la vilaĝon. Li, la reĝo de tiu vilaĝo! Li, la imperiestro de la mondo! Ĉu li ne efektive pravis? Ĉu ne vere la reganto de la mondo estas tiu, kiu kiel Erik ekmarŝas al pli bona vivo!?

La avino sciis kiel akcepti malgrandan reĝon, kiu almarŝis sen scepro, sed kun multe da apetito! Ŝi tuj kunvokis pluajn gastojn, malgrandajn kaj grandajn, nudapiedajn kaj sandalportantajn. Ankaŭ la dombestoj ĝojis pri lia alveno. Eĉ la koko afable kokerikis sian saluton, kvankam ĝi ne alfajfeblas kiel hundo, kiel ĉiu scias. Mentoteo atendis la gravan gaston. La manĝotablo estis plena de bonaĵoj. Kaj Erik ne lasis nomi sin festfuŝulo! Li manĝis kiel triopo, tiel ke li baldaŭ havis la senton, ke li tuj krevos. Kiam la gastoj ĉiuj jam adiaŭis kaj foriris kaj li fine sidis sola kun la avino, ŝi diris al li: „Erik, estas jam tre malfrue, nun vi devas iri hejmen, ĉar alikaze la patro... la patrino... nu, Erik, estu prudenta!”

Sed Erik eĉ ne pensis pri tio esti prudenta. La vorto efikis al li kiel ruĝa tuko al bovo en areno: „Kion? Reiri? Mi? Neniam! Ne al la malica patro. Li nur venu! Mi, Erik, restos ĉi tie! Tio estas mia firma decido!” La avino ridetis rezignante kaj atendis, kio okazus.

Vesperiĝis kaj noktiĝis, sekvis tre bela tago, kaj denove vesperiĝis. Sed tiam alvenis la patro, la fulmotondro, la ŝtormo, la uragano. Li tiom furiozis, ke eĉ la kuraĝa avino ne provis kontraŭdiri ion. Gardante ŝi stariĝis antaŭ la knabo. Sed la patro fine kaptis la filon kaj tiris lin per elementa forto kun si. La knabo hirtiĝis kaj kriis. Obstine li provis rezisti. Sed la patro tiris lin brutale post si.

Post la forlaso de la vilaĝo li kaptis lin de malantaŭe sur la ŝultroj kaj puŝadis lin antaŭen. La fortika patro estis jam denove ebria, ĉar li trinkis gluton post gluto el brandoboteleto. Iom li ŝanceliĝis kiel granda arbo kaj kriaĉis: „Filo havu hejme sian lokon, perfidulo, hejme! Ĉu vi komprenas tion, friponeto, ĉu vi komprenas tion?”

Hejme, fiulo!”

Erik tremis je la tuta korpo, ĉar la patro estis ebria kaj tial des pli danĝera. Erik plorsingultis, pro malespero kaj honto. La malica patro trotis malantaŭ li. Pli kaj pli malheliĝis. La tritikotigoj ĉe la vojrandoj apenaŭ plu videblis. Eble ili ankaŭ nur kaŝiĝis, ĉar estis certe tro dolorige por ili devi vidi kiel malgranda reĝo inter kruelaj homoj devas suferi.

„Hejmen! Hejmen! Kanajlo! Mi rompos al vi la ostojn, kiam ni estos hejme, certu pri tio!”

Sub la feraj manoj de la patro la knabo devis iri kliniĝinte. Pri fuĝo eĉ ne estis penso en tiu momento.

„Hejmen! Hejmen! Fuĝinto!”

Sub maljuna kverko, kiu staris sola meze de la du vilaĝoj la fereca mano stopis la knabon. Kaj poste batis peza pugno ie el la malhelo sur lian vizaĝon. La knabo havis la senton, kvazaŭ granda ŝtono rompiĝus sur lia kapo. Por momento li vidis nenion plu. Li turnis sin lante flanken, por eviti plian baton. Kaj iom poste ekis fajna tintado en lia kapo, iel tiel, kvazaŭ iu en tre tre fora distanco tintigus gracilajn sonoriletojn. Per unu fojo perdiĝis la doloro kaj granda kvieto disvastiĝis en li. Li ekvidis nun klare kristale flavajn steletojn, kiuj dancis tiel gaje antaŭ liaj okuloj, kavazaŭ ili volus okulumi al li mesaĝon: „Malgranda Erik, ne estu malĝoja. Almenaŭ ni, la malgrandaj steletoj estas viaj amikoj. Ni forprenis la doloron de vi. Se denove iu batos vin, ni helpos al vi plian fojon. Kaj se iu kantos la kanton: „Ĉu vi scias, kiom da steletoj staras en la granda firmament’?, tiam vi ja nun scias, kiom da ili estas, tiam vi ne devos unue nombri ilin.”

*Kiom da steletoj staras,
kara, sur la firmament’?
Kiom da nubetoj faras
preterflugon en la vent’?
Ilin ĉiujn nombri Dio,
ke ne fine manku iu
en la granda tuta kvant’.*

Ili pravas, pensis la malgranda Erik. Malĝoje li rigardis al la vizaĝo de la patro, kiu rigardis lin mirigite. La malĝoja rigardo de la knabo per unu fojo sobriĝis lin. Konsternite kaj plena de honto li konsciiĝis subite, ke li ĝis nun ankoraŭ neniam serioze batis la filon.

„Kio estas, filo mia? Kial vi tiel strange rigardas min?”

„Patro, mi havas demandon al vi, ĉu vi scias, kiom da steletoj staras tie en la ĉielo, ĉu vi povus nombri ilin por mi?”

„Kial vi demandas tiel strange? Filo, kion vi havas? Kiel mi sciu tion? Ĉu ĉio estas en ordo je vi? Estas tro multaj, filo mia.”

Sed la filo respondis: „Ne, patro, estas nur malmultaj, tre malmultaj, mi ĝuste vidis ilin antaŭ mi, tiom proksime, kvazaŭ ili elsaltus el miaj okuloj.”

Ili rigardis sin reciproke dum momento kaj poste ili iris silente hejmen al la patrino, kiu jam plena de timo atendis ilin.

Rimarko: La verso estas el la germana kanto „Dio scias”, teksto: Wilhelm Hey (1816) Kanto, kiu ĉiam tre impresis min pro sia tre humana mesaĝo. Mi ĉiam sentas min persone alparolita, se mi aŭdas la kanton.

"Komune festi la Novan Jaron"

Ni invitas vin partopreni en la dekseca NR, denove en [Saarbrücken](#), urbo ĉe la franc-germana landlimo. Refoje ni ŝatos ĝui agrablan etoson kun amikoj, konatoj kaj novuloj. Multaj denove estos el la meza generacio, kun aŭ sen kunuloj kaj infanoj; ankaŭ ĉi-foje ni sincere bonvenigos homojn pli aĝajn kaj pli junajn.

NR Novjara Internacia Semajno (NIS) Programo Lingvo-kursoj

Novjara Internacia Semajno (NIS)

Samtempe okazos la naŭa [Novjara Internacia Semajno \(NIS\)](#) por junuloj kaj junaj plenkreskuloj. Montriĝis dum la pasintaj NR/NIS, ke la kunestado de ambaŭ celgrupoj tute bone funkcias. Ni antaŭvidas ankaŭ ĉi-foje kune loĝigi la NIS-partoprenantojn. (La ceterajn koridorojn ni dividis inter familioj kun infanoj kaj pli kvietemaj unuopuloj kaj paroj.)

Internacia partoprenantaro

En la "Novjaraj Renkontiĝoj" (NR), dum la lastaj jaroj kun la "Novjara Internacia Semajno" (NIS), ĉeestas inter 150 kaj 210 partoprenantoj; ili aĝas inter kelkaj monatoj kaj naŭdeko da jaroj. Partoprenas kutime trideko da familioj kun ĉ. sesdek infanoj kaj junuloj; krome ĉeestas kvindeko da unuopuloj kaj paroj sen infanoj. Ili loĝas en deko da landoj - feliĉe du trionoj venas el eksterlando kaj kreas bele internacian etoson. Al tiu kontribuas ankaŭ, ke por trideko da infanoj kaj junuloj Esperanto estas denaska lingvo.

NR Novjara Internacia Semajno (NIS) Programo Lingvo-kursoj
Kotizoj Nura programpartopreno Kondiĉoj Aliĝilo/informpetilo

EsperantoLand e. V.

Louis Ferd. v. Wunsch-Rolshoven

Wiciefstr. 9, 2. Gartenhaus

10551 Berlin

Germanio

[Kontakt](#): Tel.: 030-6855831 aŭ 0173/1629063

ILEI raportas:

50-a Kongreso de ILEI en Busano, Koreio

Bonega organizado flanke de la LKK

Mirinde belaj artaj kontribuoj de lokaj muzikgrupoj

Interesaj prelegoj kaj debatoj

Tre komforta junulargastejo ARPINA kun vastaj ofertoj

Aliĝis 196 personoj el 29 landoj. Partoprenas nun proksimume 130 personoj el 21 landoj. La diferenco fontas el la malstabila tutmonda situacio politika, kiu havis kaj havas timigajn efikojn en orienta Azio. Pluraj kongresanoj rezignis aŭ ne sukcesis akiri vizon. Ok afrikanoj ne aperis. El la estraro ĉeestas nur tri personoj : la vic-sekretario Elena Nadikova, la vic-prezidanto Gong Xiaofeng kaj la prezidanto Mireille Grosjean. Laŭ tiu forta virina ĉeesto la landaj salutantoj okaze de la malfermo estis prefere virinoj, defio preskaŭ komplete plenumita.

La Komitato kunvenis lunde dum kvar horoj. Kvorumo estis. Ĝi decidis pri nomumado de novaj Honoraj Membroj. Elektiĝis la forpasinta Paul Gubbins kaj unu arda laboranto de la ĉina movado : HU Guozhu. La Komitato aprobis la agadraporton pri la jaro 2016 same kiel la finanĉan raporton, kaj tiel malŝarĝis la estraron. Laŭdoj kaj dankoj audiĝis pri la laboro de la estraro.

La frandvespero ebligis gustumi pladojn el diversaj mondopartoj laŭ la kutimo de ILEI por la unua vespero. Sekvis la nacia vespero kun preskaŭ 50 artistoj, dancistoj, muzikistoj, en buntaj kostumoj. La internacia vespero amuzis la kongresanojn kaj okaze de ĝi ĉinoj, japanoj kaj koreoj dancis polan polonezon same kiel eŭropanoj dancis japanan farandolon; la tuta publiko kantis armenajn melodiojn kaj kunkantis refrenon de rusa gitaristo. Skeĉoj tre amuzaj alportis ridojn ĉe ĉiuj, ĉefe kiam seriozaj kaj altnivelaj prelegantoj prezentas ion amuzan en ne atendita maniero. Varma temperaturo kaj humida aero, jen la vetero, kiu regas kutime en julio en orienta Azio. La ĉielo pli blankas ol bluas. Tamen la klimatiziloj de ARPINA donas agrablan senton al la kongresanoj. La sametaĝa teraso ofertas varmecon al tiuj, kiuj tion ŝatas.

Busano, 2017-07-18

Mireille Grosjean

Unesko-Kuriero en Esperanto eldoniĝis



Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje respondis: "se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*". (*Eventoj*, 2000, N^o182). Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe la esperantistaro.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora *Unesko-Kuriero* en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio. Dank' al kortuŝa kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la unua numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto estas eldonita. La du versioj en Esperanto estas same aspektaj kiel la UN-lingvaj versioj.

La papera versio (ISSN 2521-7356) estos aĉetebla ĉe la libroservo de la 102a UK kaj poste daŭre ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo: http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf

Fonto: Gazetara Komunikado de UEA, 2017, N^o693.

Lexus eldonos nur ses numerojn de Heroldo en 2017



Sociale Grupo Lexus el Brazilo komunikas:

1) La jarkolekto 2017 de *Heroldo de Esperanto* havos nur ses numerojn. Unu estis jam publikigita [en majo] kaj restas kvin numeroj por aperigo ĝis la fino de la jaro.

2) La abonantoj de la papera versio nenion malgajnos, ĉar

a) la abonantoj por dek du numeroj ricevos ses numerojn de la jarkolekto 2017 kaj ses de la jarkolekto 2018;

b) la abonantoj por kvar numeroj ricevos kvar numerojn de la jarkolekto 2017.

3) La abonantoj de nur la reta versio nenion malgajnos: dum la reta versio (retejo) ne pretiĝas, oni ricevos la PDF-version, sed la periodo de la abono validos por respektive dek du aŭ kvar monatoj nur post la ekfunkciigo de la reta versio.

Fabrício Valle
direktoro

Fonto: HeKo 651 4-B, 13 jul 2017

Laborplano donis nur hirtajn harojn



Preskaŭ nenio el la Strategia Laborplano de UEA estas realigita. La asocio ne sukcesis eĉ ellabori novan planon. Paweł Fischer-Kotowski demandas sin, ĉu Mark Fettes ankoraŭ havos tempon pravi sian taŭgecon por la prezidant-posteno.

Fabrício Valle, la unua el la viceto da redaktoroj elektitaj de la Fettes-estraro(j), sur la kovrilo de sia unua numero de Esperanto demandis: "UEA... UEA... UEA... Kien vi iros?". La demando restas aktuala ankaŭ nun, kiam la revuo aperas ĝustatempe kaj malhavas tian filozofiuman karakteron. La respondo tamen daŭre mankas.

Ankoraŭ kelkajn semajnojn antaŭ la kongreso en Seulo, kiam la prezidanto sendis al la komitatoj estraran kaj finanĉan raportojn, li deklaris: "(...) ni poste sendos plurajn aldonajn labordokumentojn, i.a. pri modernigo de la kotizsistemo, pli travideblaj manieroj trakti la buĝeton, kaj proponojn pri nova Strategia Plano kaj Laborplano."

El tio venis nur la skizo por diskuto pri la nova kotizosistemo kaj la malklara rearanĝo de la buĝeta propono. Nenio pri la strategiaj dokumentoj. Same nenio pri la pliaj ŝanĝoj en la Statuto, promesitaj ankoraŭ en Nitro.

Sed plej okulfrapa estas la manko de la “Strategia Plano kaj Laborplano”. La periodo de la ĝisnuna, kiu antaŭ kvar jaroj rolis kiel elektoprogramo de la Fettes-teamo, ĵus finiĝis kaj mankas novaj direktoj por la asocio.

Ĉu mi riproĉas la estraron pri la manko? Neniel. Sufiĉas foliumi la Strategian Laborplanon 2013–2017 por kompreni, ke tiu dokumento ne estas multe pli ol nura peco da papero kun presitaj literoj. Eventuale tuta fasko da papero.

Finfine, la amplekso de la plano devus nun roli iel avantaĝe al la estraro: el tiom longa listo da farendaĵoj estas pli facile elskrapi tion aŭ jenon por diri: nu, io tamen estas realigita. Sed ne. Apud la lastjara akuta financa deficito (reale 86.700 eŭroj – ni memoru kaj daŭre memorigu!) regas la “agada deficito” kiun tiom volis eviti la estraranoj.



Unu el la grandaj planoj estis starigo de la nova retejo por kiu la komitato disponigis en 2013 harhirtigan sumon de 100 mil eŭroj. La estraro disponis pri ĉio: la povo, la financaj rimedoj, en la lasta jaro eĉ plene subigita ĝenerala direktoro. Nenio helpis.

La retejo uea.org ŝanĝis nur la fasadon – laŭ la skemo ellaborita ankoraŭ antaŭ la Fettes-erao. Kaj krom tio ni ricevis abundeton da mortnaskitaj retejetoj: aktivulo.net, esperanto.center, esperanto.net aŭ revuoesperanto.org. Neniu plu povas orientiĝi inter tiuj paĝoj, sed ne indas eĉ provi – laŭ aspekto, sed precipe laŭ enhavo, ili ne estas interesaj kaj kreas nur falsan impreson de abundo.

Sed kio pri aliaj planoj? Kio pri Tutmonda Inform-Reto, Nitobe-raporto, tutmonda inform-kampanjo pri lingva-kultura diverseco? Kio pri la reta kurso e125? (Intertempe nia lingvo jam 130-jariĝis!) Kio pri la reta kurso pri terminologio? Kio pri la modernigo de la Delegita Reto, la libroserva vendokampanjo? Kaj fine, kio pri la ĉiujara 10%-a

kresko de la membronombroj? Mi demandas nur pri kelkaj elektitaj eroj, la tuta strategio konsistas en 36 paĝoj!

Antaŭ ol akcepti novan strategion, la komitato devus postuli de la estraro detalan raporton pri la plenumo de ĉiu unuopa celo el la Strategia Laborplano 2013–2017.

Se iu plano ne povis esti realigita, ni devas koni la kialojn – ĉu bremsis la financoj, ĉu manko de laborfortoj en la CO, ĉu kulpas la estraro kiu okupiĝis pri margenaj, neplanitaj aferoj (ŝanĝo de la Statuto, sendependigo de TEJO – ve, kiom da tempo kaj atento tio rabis!)?

Aŭ eble la Strategia Laborplano estis tro fantazia, kiel iuj atentigis jam en 2013? Ĉiel ajn, sen detala analizo pri la ĝisnuna strategio, mankas bazo por decido pri la nova dokumento.

Por ŝpari la tempon, estus pli facile ĝisdatigi la jarnumerojn kaj fine ekzorgi pri la realigo de la planoj jam faritaj.

Same kiel Barack Obama, la prezidanto de Usono, kiu ricevis la Nobel-premion pri paco antaŭ ol atingi ion ajn, en 2013 Mark Fettes estis elektita la Esperantisto de la Jaro. Tio estis kvazaŭ fido-kredito por la revolucio kiun li tiom entuziasme aŭguris almenaŭ ekde 2012.

Li havas ankoraŭ du jarojn, en kiuj li povas prui sian taŭgecon por la posteno. En 2019 la komitato kunvenos en Lahti por elekti novan prezidanton – laŭ art. 34 de la Statuto post la dua oficperiodo Fettes devos retiriĝi el la posteno.

La tempo komencas elĉerpiĝi, Mark!

Paweł Fischer-Kotowski

La teksto aperis en parenteze.net.

LA 50-a ILEI-KONGRESO EN BUSAN 15.-22.7.2017

Meze de julio ILEI malfermis la serion de tri esperantaj kongresoj en Koreio. Post ĝi sekvis la 102-a UK en Seulo kaj tuj poste la 90-a SAT-kongreso en la apuda urbo Gimpo.

La kongreso de ILEI okazis de la 15-a ĝis la 22-a de julio en la dua plej granda urbo en Koreio Busan, situanta en la suda parto de la lando. Fakte la kongreso estas la unua kun tiu-ĉi nomo. La decido estis prenita pasintjare en *Nyíregyháza*. Antaŭe temis pri ILEI-konferencoj.

La kongreson partoprenis 170 gesamideanoj el 21 landoj. La akcepto estis varma, same kiel la lando mem. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj de la junulara gastejo *Arpina*. Ĉiuj programeroj okazis en la oka etaĝo de la konstruaĵo. La temo de la ĉi-jara kongreso estis: "Edukado al Respektoplena Turismo". Ĝi estis plenumita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al interesaj lokoj.

Sabate, dum la interkona vespero ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj ni ĝuis gruo- kaj masko-dancojn.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean, bonvenigis la kongresanojn. Estis legataj kelkaj bondezirmesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

Estis enkondukitaj novaj programeroj: "Pedagogia foiro" kaj "Literatura kafejo". Tiucele estis prezentitaj kelkaj libroj kaj paroladoj pri diversaj temoj. La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklorokulturo. Subtila estis *Dongrae* - la gruodanco, konata jam de la unua vespero.

La semajna programo inkluzivis E-kurson por komencantoj gvidatan de Annie Grente, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain Lelarge kaj la instruistan trejnadon mastris Katalin Kovats. La fidelaj partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de Park Yongsung (Nema). Kun Mireille ni krozadis tra la lingvoj. Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi... En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj, pri E-centroj kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis sian laboron dum pluraj kunsidoj kaj ankaŭ estis pritraktita la "Jaro de la Lernanto".

Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo kun 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentitaj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el filmokonkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mondvojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija Beloŝeviĉ parolis pri pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aurora Bute vestita en bela rumana kostumo parolis pri kulturaj specifaĵoj de Rumanio. Sur prezentitaj bildoj ni povis admiri pentritajn preĝejojn ankaŭ de ekstere. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn.

Kortuŝa estis la rakonto pri "Miljara Animo" (Koryo te-bovlo). Rob Moerbeek prezentis la korean literaturon. Interesa estis la ludo "Bafa-Bafa", en kiu temis pri konfronto de du malsamaj kulturoj.

Tre bongusta kaj enhavriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de koreaj specialaj manĝaĵoj.

Al kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongju, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis enrigardebla. Sekvis vizito de monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditado. Impresa estis vizito al templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos venontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille Grosjean prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj pri la Rezolucio. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis bondeziroj de urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro. Ni ĝuis viglan kaj agrablan semajnon.

Liba Gabalda

La 90-a SAT-KONGRESO 29. 7. - 5.8. 2017

Ĉi-jare la unuan fojon, la SAT-kongreso okazis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo 105 kamaradoj el 16 landoj ĝuis la 90-an SAT-kongreson en apudseula urbo *Gimpo*, proksime de la bordo ĉe la Flava maro. Ĉefe la azianoj havis ŝancon konatiĝi kun alilandanoj, praktiki la lingvon kaj sperti la SAT-etoson. Junaj japanaj partoprenantoj tre aprezis personan kontakton kun esperantistoj el diversaj landoj.

Koreanoj bonvenigis nin kun rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo *Yakam*, kie okazis la antaŭviditaj programeroj. Krome, je dispono al la kongresanoj estis senpaga aliro al kuracaj banakvoj. Tion pluraj el ni profitis ĝissate.

Ĉe la alveno, post la registriĝo kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj partoprenantoj povis elekti (laŭ sia grandeco) verdan T-ĉemizon kun surskribo: "SAT-tutmonda solidareco". La kongresa temo estis: "Demokratio en nuntempa mondo". La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro en pli granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate dum la interkona vespero prezentiĝis du muzikbandoj de la "Paca agado sur strato".

Dum la malfermo Vinko Markovo donis informojn pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de PK kaj OKK sekvis salutoj de kelkaj organizoj: Rob Moerbeek salutis nome de UEA, Dieter Rooke nome de komunistoj, Franciska Tubale nome de Radio Melbourne kaj mi nome de fervojistoj. Malantaŭ la hotelo ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano "Se ni kune sonĝas kaj praktikas, Alia Mondo Eblas!" Tuj poste sekvis prelego pri kandelluma revolucio, kiu sukcesis forigi la prezidantaron de Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: "Multitudoj kaj absoluta demokratio". Interesan sciencfiksan prognozon pri evoluo de guglo kaj ĝia pasporto prezentis Hiongun KIM. Li kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo "Espera Mondo". Sonis diversaj, al ni nekonataj, instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton *Ariari*, muziki kaj danci kun la bele vestitaj aktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn.

Ekde lundo komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jar-raportoj. Okazis diversaj diskutoj, konferenco pri unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj - liberecana, vegetara, komunista, sennaciista, verdula, liberpensula.

Inter prelegoj elstaris tiu pri "Nuklea akcidento en Fukuŝima" prezentita de Hori Jasuo. Pri antropologio, kartografio kaj koloniismo prelegis Guilherme Fians el Brazilo. "Enrigardon al la korea literaturo" prezentis Rob Moerbeek. Pri "Koreaj lingvo kaj historio" prelegis Ho Song. Pri "Esperanto kaj klasikaj lingvoj" donis informojn Saioa Escobar. "La rusan revolucion 1917" rememorigis Dieter Rooke. Pri "Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin" kaj belegajn bildojn prezentis Maria Butan el Rumanio. Pri sia domo en Kreto parolis Annie Grente. "La memoro de E-movado" pri Eduardo Vivancos, nuntempe 97-jaraĝa parolis Xavi Alcalde, "Notoj pri monda kapitalismo" skizis Miyazawa Naoto el Japanio. Pri ĉina Tajpeo por Tajvano ni eksciis de Albengo. Pri "Fak-laboro en Fejsbuko" informis Neil Blonstein. Tradukatelieron gvidis Annie Grente. Ege bela ateliero montriĝis pri kreado de mandaloj per sablo. Hori Jasuo muzikis per diversaj malgrandaj muzikiloj akiritaj dum liaj multnombraj vojaĝoj. Ni eksciis pri la eldona fako kooperativa. De Alberto Calienes ni ricevis informojn pri

Kubo kaj de Alfonse Waseka pri la Demokratia Respubliko Kongo.

Kulturaj vesperoj estis dediĉitaj al muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. Belan koncerton prezentis la litova ensemblo "Sepa kaj Asorti". Kun scivolemo ni spektis teatran komedion "La malfermilo" prezentita de Saŝa Filipoviĉ kaj Franciska Tubale. Spektinda estis ankaŭ aŭkcio de esperantaĵoj iniciita de Tahira Masako (nomata Masakato). Estis kolektitaj pli ol 300 eŭroj por la SAT-movado. Dum la distra vepero ni ĝuis korean operon *Ariari* de la familio Lee Eunwoo. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj lokoj de la lando. Belega estis tiu al *Buyeo*, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon. Alia, ne malpli interesa montris la "Pacan observejon", en *Ganghwa* insulo, kie ni estis plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝi. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon, dum la kvara laborkunsido, estis ellaboritaj kaj prezentitaj Gvidrezolucio kaj Deklaracio. Vespere okazis fermo de la kongreso kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de la organiza teamo. Ĉe la fino Saŝa Filipoviĉ prezentis la venontjaran urbon Kragujevac en Serbio, kie okazos la 91-a SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto.

La ĉi-jara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra, kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konversacioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.

Liba Gabalda

La 102a UNIVERSALA-KONGRESO 22-29.7. 2017

La duan fojon la UK okazas en Suda Koreio en ties ĉefurbo Seulo. La prestiĝa evento disvolviĝis fine de julio en Hankuk Fremdlingva Universitato. Kolektiĝis 1174 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj allogataj de la azia kulturo. Novuloj spertis esperantistan etoson kaj ĝuis interesajn momentojn en amika rondo.

En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato flirtis E-flagoj anoncantaj la eventon. Koreaj samideanoj produktis amason da belegaj afiŝoj kaj banderoloj por diversaj Esperanto-okazaĵoj. Dum la daŭro de la kongreso ili konstante kaj pasie laboris por nia bonfarto.

La inaŭgurtago bonvenigis nin pluve. Tamen tio ne malhelpis entuziasman renkonton kun malnovaj kaj novaj geamikoj. En la enirhalo la kongresanoj povis admiri kelkajn ekspoziciojn: fotoj el pasintaj kongresoj, pri L.L.Zamenhof, pri Esperanto kaj admirinde belaj estis ventumiloj. Eblis sin vesti kaj fotiĝi en reĝaj kostumoj.

La kongreso konsistis el la kutimaj programeroj de movada foiro, kleriga lundo, tago de lernado, merkredaj tuttagaj ekskursoj, junulara programo, komitata forumo, strategio kaj kunsidoj, traktado de la kongresa temo, kiu ĉi-foje estis: "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Okazis IKU-AIS sesioj, lingvaj kursoj kaj KER ekzamenoj, kunvenoj de diversaj asocioj, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-

Movado), LIBE (Ligo Internaciaj de Blindaj Esperantistoj), IKUE-KELI, (kristanaj organizoj) ISAE (sciencistoj) IKEF (komercistoj), IEJA (juristoj), TEĴA (ĵurnalistoj), IREK (komunistoj), TADEN (nefumantoj) kaj aliaj.

Kunvenis ankaŭ legantoj de Esperanto, ateistoj, Akademio de Esperanto, Afrika-, Oomoto- kaj Ŭombulismo movadoj. Okazis multaj aliaj interesaj programeroj, inter kiuj pluraj prelegoj pri Koreio, Aŭtoraj duonhoroj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, Aŭkciado. Ne mankis komuna fotado, urba akcepto, bankedo kaj kongresa balo, kiun animis la litova grupo Asorti. Ĉi-foje ne okazis strikta kontrolo ĉe enirpordoj al la diversaj okazaĵoj. Ankaŭ neniu estis priŝtelita laŭ mia scio. La kongresanoj povis manĝi je modestaj prezoj en studenta manĝejo.

Enkondukiĝis nova programero Korea Kulturĉambro, kie ni povis gustumi korean teon, mem ornami ventumilojn per sekigitaj floretoj, lerni danci kaj sekvi prezentojn de korea folklorkulturo.

Ekster la programo okazis Internacia Pontkunveno en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la korea Duoninsulo, kiun ĉeestis 130 personoj el 21 landoj.

Estis elektitaj du Honoraj membroj de UEA kaj disdonataj diplomoj pro elstaraj agadoj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, premio Deguĉi, atestiloj pro 50- kaj 40- jaraj membriĝoj en UEA. Estis eldonita poŝtmarko kun portreto de L.L. Zamenhof kaj serio da belaj bildkartoj.

Kongresa Kuriero "La Kandellumo verda" anoncis ĉiujn novaĵojn, ŝanĝojn en la programo, impresojn de partoprenantoj, en la listo aperis novaliĝintoj ktp. Kiel ĉiam, ampleksa estis la libroservo.

Gaja surstrata manifestacio kun tamburado sin direktis al loko, kie okazis la futbalmatĉo, en kiu unuafoje gajnis la esperantista teamo je granda ĝojo de ni ĉiuj.

Pluraj ĉiutagaj ekskursoj ebligis konatigi nin kun la naturo de Koreio, kiu konsistas el maro, montoj, riveroj, kampoj, vilaĝoj, urboj kaj urbegoj, palacoj, ĝardenoj, temploj kaj aliaj diversaj kulturaĵoj de jarmila historio.

Dum vesperaj kulturaj programeroj prezentis koncertojn Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Eruda Li kaj Maju. La teatraĵon "El la vivo de insektoj", prezentis la ĉeĥa ensemblo DOMA. La trupo Espera Mondo prezentis koreajn tradiciajn artojn. Dum la Nacia vespero prezentiĝis la simfonia orkestro *Arirang* kaj ni povis spekti diversajn admirindajn programerojn. Ankaŭ la Internacia Arta kaj Azia vesperoj estis mirindaj.

En la fermo de la Universala Kongreso ni eksciis pri la venontaj kongresurboj. En la jaro 2019 la kongreso okazos en Lahti, Finnlando kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. La venontjara UK disvolviĝos en Portugalio, en ĝia ĉefurbo Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto.

Bonetosa estis la fermo de la kongreso al kiu kontribuis la nederlanda grupo Kajto. Laste prezentiĝis infanoj el la Infana Kongreseto, kiuj venis saluti nin en rekorde granda nombro.

Ĉiuj, kiuj povis partopreni la ĉi-jarajn kongresojn en Koreio devas senti sin feliĉaj. Koreaj sindonemaj kaj laboremaj samideanoj ne sensiluziigis nin pri la pasintjare promesita grandioza kongreso kun surprizoj. Ni plene ĝuis ilian gastamon en amikeca harmonio.

Liba Gabalda

Zamenhof-ekspozicio en Vilno



Okaze de la centa datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Pollando mendis ĉe Centro de Interkultura Edukado ekspozicion pri la vivo kaj kreado de Ludoviko Zamenhof "Zamenhof – La kreinto de Esperanto" por ekspozicii ĝin en diversaj landoj. En Litovio ĝin ricevis la Pola Instituto en Vilno, kiu adaptis ĝin al la litova lingvo (Ĉiuj informoj estas en Esperanto kaj la litova). La Pola Instituto kontaktis Litovan Esperanto-Asociacion (LEA) kaj Litovian UNESCO-komisionon por kunlabore efektiviĝi tiun projekton. LEA ĉefe okupiĝis pri informado pri la ekspozicio kaj pri ĝia reklamado en diversaj medioj, ĉefe en amaskomunikiloj de Litovio (en la litova, pola kaj rusa lingvoj). Estis decidite okazigi la ekspozicion en galerio de Litovia UNESCO-komisiono en Vilno. Kiel konate, la datreveno estas solennata sub aŭspicio de UNESCO.



La 9an de aŭgusto 2017 okazis la solena inaŭguro de la ekspozicio kun ĉeesto de pli ol 60 personoj, el ili duono estis esperantistoj. Dum la solena inaŭguro parolis la


gvidantino de la kulturaj programoj de Litovia UNESCO-komisiono Milda Valančiauskienė, direktoro de la Pola instituto, konsilanto de la Pollanda ambasadejo en Vilno Marcin Łapczyński kaj prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. En la inaŭguro partoprenis ankaŭ konsilanto de la ministro pri edukado kaj scienco de Litovio prof. Eugenijus Butkus, ambasadoro pri specialaj taskoj el la ministerio pri eksterlandaj aferoj de Litovio Dainius Junevičius, ĝenerala sekretario de Litovia UNESCO-komisiono Asta Junevičienė, profesoro de la Universitato Vytautas la Granda (Kaŭno) Andžejus Pukšto, profesoro de la Jura Universitato Mykolas Riomeris (Vilno) Alvydas Baležentis, ĵurnalistoj kaj fotistoj. Ĉiuj venintoj estis regalitaj per vino.

La ekspozicio konsistas el 18 profesie aranĝitaj paneloj, kiuj informriĉe rakontas pri diversaj aspektoj de la vivo de la kreinto de Esperanto (La biografia skizo, La familio de Zamenhof, La nepo de Zamenhof, Zamenhof kaj Bjalistoko, Zamenhof en Varsovio, La naskiĝo de Esperanto, La morto de Zamenhof, Zamenhof-Esperanto-objektoj, Famo de Zamenhofa kreaĵo, Heredaĵo de Esperanto, Monda literaturo en Esperanto, La meritaj esperantistoj, Internaciaj Esperanto-organizaĵoj, La eduka sistemo de Esperanto, Lerne Esperanton per...). Krome, estis ekspoziciataj ĉiuj ses libroj pri Ludoviko Zamenhof, eldonitaj en Litovio en la litova lingvo.

La ekspozicio daŭros ĝis la 19a de septembro, poste de la 25a de septembro ĝis mezo de novembro ĝi estos ekspoziciata en la ĉefa regiona biblioteko de Kaŭno. La posta loko de la ekspozicio estos la urbodomo de Kaŭno, tie ĝi lokiĝos ĝis la jarfino. Januare-februare 2018 ĝi funkcios en la Universitato Vytautas la Granda. En marto 2018 ĝi iros al Panevėžys por esti ekspoziciata en la regiona biblioteko de Panevėžys. Sekvos aliaj urboj de Litovio. Ni planas eksponi ĝin en ĉiuj 60 distriktaj urboj de Litovio kaj tio daŭros ĉirkaŭ kvin jarojn.

La 7an de septembro en la ekspozicia salono de UNESCO en Vilnio ankoraŭ dum la funkciado de ĉi tiu ekspozicio okazos "metiejo de Esperanto", en kiu du grupoj (lernantoj kaj ĝenerala publiko) baze konatiĝos kun Esperanto kiel lingvo kaj ekscios pri la nuna situacio de la Esperanto-movado en la mondo kaj en Litovio.

Tiu-ĉi ekspozicio estas bona ekzemplo kaj rezulto de modela kunlaboro inter Pollandaj kaj Litoviaj institucioj.



LEA lerte uzis la okazon por informi pri Esperanto tra la tuta Litovio antaŭ la ekspozicio, dum la inaŭgura tago kaj post la inaŭguro. Ampleksan gazetaran komunikon pri la ekspozicio aŭ pli vastan materialon pri Ludoviko Zamenhof kaj pri Esperanto anticipe aperigis la tutlanda gazeto *Lietuvos aidas* (papera kaj reta versioj), la Vilna semajna gazeto *Sostinė* (ankaŭ rete kaj papere), la dusemajna gazeto de Litoviaj sciencistoj *Mokslo Lietuva* (rete kaj papere), la retejo de Litoviaj sciencistoj, novaĵretejoj www.alkas.lt, www.etaplus.lt, www.lrytas.lt, retejo de la Litovia Ĵurnalista Asocio, retejo de la Litovia Nacia Novaĵagentejo ELTA. Kompreneble, informoj kelkfoje aperis en la retejoj kaj Facebook-paĝoj de la Pola Instituto, Litovia UNESCO-komisiono kaj LEA. Gazetaran komunikon pri la ekspozicio al siaj abonantoj dissendis ankaŭ la novaĵagentejo BNS (Baltic News Service). Materialo pri la ekspozicio aperis ankaŭ en kelkaj amaskomunikiloj de Pollando. La gazetara komuniko pri la ekspozicio estis sendita al pli ol 250 gazetoj, revuoj, novaĵagentejoj, novaĵretejoj, televido, radioj, diversaj organizaĵoj, apartaj gravuloj k.a.

Ankaŭ multaj informoj pri la ekspozicio kaj Esperanto aperis dum la inaŭgura tago. La Litovia nacia radio matene la 9an de aŭgusto kelkfoje ĉiuhore informis pri la malfermata ekspozicio kaj pri Esperanto. La unua vicprezidanto de LEA Audrys Antanaitis sufiĉe longe parolis pri Esperanto dum la taga programo de la Litovia nacia televido *Laba diena, Lietuva* (Bonan tagon, Litovio). La prezidanto de LEA Povilas Jegorovas kaj la direktoro de la Pola Instituto en Vilno Marcin Łapczyński estis intervjuitaj por la ĉiutaga ĉefa vespera novaĵprogramo *Panorama* de la Litovia nacia televido. Povilas Jegorovas estis intervjuita ankaŭ de la novaĵretejo www.alfa.lt, de la pollingva programo de la Litovia nacia radio, de la redakcio pri kulturo de la Litovia nacia radio, kaj de la pollingva gazeto *Tygodnik Wilenszczyzny*.

La informa agado daŭros.

*Povilas Jegorovas
(el "La Balta Ondo")*

PROFESIE PRESITAJ LIBROJ JAM EKDE 1 EKZEMPLERO!

La "Eldonejo Libera" kun gvido de Lode Van de Velde eldonas profesie presitajn librojn malaltkvante, kaj volas doni lokon en sia katalogo al ĉiu, kiu volas eldoni verkon en Esperanto. Se ankaŭ vi havas manuskripton kaj volas eldoni ĝin en libra formo, sendu ĝin al la eldonejo, kiu ofertas ankaŭ tantiemon. Pri la ISBN-numero pretas zorgi la eldonejo.

La eldonataj libroj estos aĉeteblaj en la granda retbutiko Amazon, kaj ankaŭ en la retbutiko de la eldonejo, kie troveblas jam dekduo de eldonitaj verkoj, inter ili ekzemple "Baza Kurso pri Fotografio" aŭ "Manĝeblaj sovaĝaj plantoj" ks.

Pli detalaj informoj estas troveblaj ĉe: <http://e-libera.weebly.com>

Fejsbuka paĝo de la eldonejo: <https://www.facebook.com/Eldonejo-Libera-167436763613324>

Ndlr: Indas konscii, ke en preskaŭ ĉiuj landoj eldonantoj havas la devon sendi kelkajn ekzemplerojn (senpage) al sia Nacia Biblioteko (ekz. en Hungario 6 ekzemplerojn). Tio servas kaj la intereson de la ŝtato, kaj la interesojn de la eldonanto, ja tiel la libroj eniras en la oficialajn datumbazojn, kaj ili estos atingeblaj por esploristoj kaj arkivistoj.

Szilvási László

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS
<http://www.eventoj.hu>

VLADIMIR PUTIN MENCIIIS ESPERANTON!

Vladimir Putin, prezidanto de Rusio – kiel neantaŭanoncita honorgasto – la 20-an de aŭgusto malfermis la ĉi-jaran sesion de la tradicia internacia ĵaz-festivalo "Koktebel Jazz Party" en Koktebel, artista vilaĝo en Krimeo, kie li diris i.a.: "Muziko - ĝi estas lingvo, jen ĝi estas Esperanto, internacia lingvo, kiu unuigas homojn."

En la festivalo "Koktebel Jazz Party" ekde 2003 partoprenis 150 konataj ĵaz-koletivoj de la mondo, ĉi jare alvenis 10 grupoj.

Elpaŝo de Putin estis registrita kaj elsendita de pluraj rusiaj televidkanaloj, la registraĵo estas videbla ekzemple en la paĝo
<https://ru.sputnik.kg/video/20170821/1034805478/putin-na-koktebel-jazz-party.html>

Szilvási László

Ret-Info / Lingvo-Studio, LS
<http://www.eventoj.hu>

<p>Eldonita en Magdeburg, ĉefurbo de la germana federacia lando Saksio-Anhalto nur kiel dosiero en pdf-formato, abonebla sendante retpoŝtan peton al la redaktoro Dieter Dungert, Bruno-Taut-Ring 3 e, DE-39130 Magdeburg Telefono: (0391) 7 21 75 61, e-poŝto: DDungert@t-online.de</p>
